Regularo de la Konkurso “Partoprenu IJK-n”

Aprobita de la TEJO-Estraro, 28.02.2025

Celo

Artikolo 1. La fonduso “Partoprenu IJK-n” estas fonduso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kiu celas finance subteni la partoprenon de junuloj de la tuta mondo en la Internacia Junulara Kongreso (IJK).

Artikolo 2. La mono de la fonduso venas el sumo buĝetita de la Estraro en la Jara Buĝeto de TEJO ĉiun jaron plus donacoj kolektitaj por la fonduso mem.

Subteno kaj rekompencoj

Artikolo 3. La fonduso kovras ĉefe la jenajn elspezojn:

(a) ekde 50% ĝis 75% de la kostoj rilataj al la vojaĝo de la subtenato de sia loĝurbo ĝis la kongresejo kaj reen;

(b) ĝis 100% de la loĝkostoj de la subtenato en la plej malmultekosta loĝeblo dum sep (7) noktoj, ekde la unua ĝis la fina nokto de la kongreso, kun aldonaj noktoj kovreblaj laŭ anticipa interkonsento kun la Estraro;

(c) ĝis 100% de la kostoj de tri ĉefaj manĝoj dum sep tagoj, ekde la unua ĝis la fina tago de la kongreso, se ilin necesas mendi aparte al loĝebloj;

(d) ĝis 100% de la programkotizo de subtenato kiu ebligas partoprenon en IJK; kaj

(e) ĝis 100% de la vojaĝasekuro kiu rajtigas aliron al necesa sanservo dum la vojaĝo;

(f) ĝis 100% de la kotizo por kandidatiĝi por vizo, se aplikeblas.

Artikolo 4. La Estraro de TEJO rajtas aljuĝi subtenon kiu valoras malpli ol la maksimumoj indikitaj en Artikolo 4 se la subtenato mem tion petas aŭ se la aktualaj rimedoj de la Fonduso aŭ aliaj cirkonstancoj tion postulas.

Artikolo 5. La fonduso ĝenerale **ne** kovras, sen escepta, eksplicita kaj anticipa permeso de la Estraro:

(a) poŝmonon dum la vojaĝo;

(b) kostojn de vojaĝoj per taksio kaj similaj servoj (ekz. Uber) aŭ de benzino por uzado de propra aŭ luata veturilo;

(c) kotizojn pri ekskursoj kaj aliaj dumkongresaj servoj ne menciitaj;

(d) vojaĝ- aŭ sendokostojn rilate al vizpetado;

(e) kostojn de eventualaj kromvojaĝoj aŭ elspezoj antaŭ, dum, aŭ post la kongreso kiuj ne rilatas al IJK; kaj

(f) ĉiujn aliajn kostojn ankoraŭ ne menciitajn.

Elektebleco de kandidatoj

Artikolo 6. Rajtas kandidatiĝi por la konkurso junuloj de la tuta mondo, sendepende de lando, genro, handikapo, ktp., kiuj plenumas la jenajn bazajn kondiĉojn:

(a) esti individua membro de TEJO je kandidatiĝo kaj en la kalendara jaro de IJK;

(b) aĝi inter 18 kaj 35 jarojn dum IJK;

(c) posedi mempritaksitan postkomencan lingvonivelon de Esperanto, ekde minimume nivelo A2 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) pri lingvoj, kiu ebligas al la kandidato bazan komunikan kompetenton en la lingvo dum la kongreso;

(d) havi validan pasporton, kun minimume ses monatoj restantaj de valideco dum la tuta vojaĝo; kaj

(e) sendi plenan kandidatiĝon kun motivletero kaj rekomendleteroj el minimume du (2) individuaj membroj de TEJO.

Artikolo 7. Aliaj kondiĉoj ne nepraj sed favore konsiderataj estas:

(a) bona skriba kaj parola kompetento en Esperanto, minimume ekde KER-nivelo B2, kiu ebligas al la kandidato aktivajn interagadon kaj partoprenon en la kongresa programo, laŭeble pruvita per atestiloj;

(b) aktivado en TEJO, landa/faka aŭ loka organizo aŭ/kaj antaŭa sperto pri organizado de eventoj;

(c) civitaneco aŭ loĝado en B-, C-, aŭ Ĉ-landoj laŭ la landokategorioj de aliĝoj al IJK;

(d) neeblo alimaniere financi la partoprenon en la kongreso; kaj

(e) klaraj planoj pri estonta agado en la Esperanto-movado, ekz. kiel IJK povas pozitive helpi kandidaton daŭrigi sian aktivadon en la Esperanto-movado.

Artikolo 8. La fonduso prioritatigas homojn, kiuj kandidatiĝas por partopreni sian unuan IJK-n. Kandidatoj kiuj partoprenis antaŭan IJK-n laŭeble klarigu kiel ili aparte bezonas partopreni ĉi tiun IJK-n kaj kion ili aparte povas alporti al ĝi.

Artikolo 9. Ne rajtas kandidatiĝi por la fonduso:

(a) estraranoj, salajrataj oficistoj kaj volontuloj de TEJO kun ĉioentena rekompenco;

(b) homoj kiuj jam antaŭe ricevis subtenon de la fonduso; aŭ

(c) homoj kiuj antaŭvidas partopreni la kongreson per aliaj manieroj kun financa subteno (ekz. projektoj kaj seminarioj de TEJO aŭ aliaj fondusoj kaj privataj iniciatoj).

Artikolo 10. TEJO laŭeble atentu pri genra kaj geografia egaleco inter la elektotaj kandidatoj kaj instigu al kandidatiĝo junulojn el subreprezentataj grupoj. Kaze de IJK ekster Eŭropo, TEJO rajtas prioritatigi kandidatojn el la gastiganta kontinento por garantii la alireblon de la kongreso al la junuloj, kiuj loĝas en tiu kontinento.

Proceduro de elektado

Artikolo 11. Pri elektado de kandidatoj kompetentas la Estraro de TEJO surbaze de la rekomendoj de la estrarano pri Kongresoj, oficisto pri Kongresoj, aŭ alia persono delegita de la Estraro.

Artikolo 12. Plej malfrue kvin (5) monatojn antaŭ IJK, la Estraro publikigas malferman alvokon por kandidatoj, kiu nomiĝas “Konkurso ‘Partoprenu IJK-n’”. La estrarano aŭ oficisto pri Kongresoj decidas pri la maniero ricevi kandidatiĝojn kaj la limdato de la alvoko. La alvoko daŭru minimume sep (7) tagojn.

Artikolo 13. Valida kandidatiĝo konsistas el:

(a) komplete plenigita formularo;

(b) motivletero de la kandidato;

(c) rekomendleteroj el minimume du (2) kaj maksimume kvar (4) individuaj membroj de TEJO; kaj

(d) atestiloj, vivresumoj, kaj aliaj dokumentoj kiuj montras partoprenon en la Esperanto-movado aŭ atestas kompetentojn kaj kontribuojn ne estas nepraj por validigi kandidatiĝon sed helpas pli bone pritaksi kandidatojn.

Artikolo 14. La estrarano aŭ oficisto pri Kongresoj povas organizi intervjuojn kun kandidatoj aŭ aliajn manierojn por pli bone pritaksi ilian taŭgecon.

Artikolo 15. La Estraro decidas pri la elekto de kandidatoj kaj informas kandidatojn ne pli malfrue ol unu monaton post la limdato de la alvoko.

Respondecoj de elektitaj kandidatoj

Artikolo 16. Ĉiu kandidato kiu estas elektita de la Estraro de TEJO por ricevi subtenon de la fonduso devas:

(a) ĉeesti la tutan kongreson,

(b) plenumi taskojn delegitajn antaŭ la kongreso;

(c) partopreni antaŭkongresan trejnadon, preparajn kunsidojn kaj aliaj kapabligajn aktivaĵojn por organizantoj kaj helpantoj;

(d) kontribui al la kongresa programo per minimume unu (1) aktivaĵo;

(e) partopreni aŭ kunorganizi specialan programeron kun aliaj subtenatoj de la fonduso;

(f) deĵori kiel helpanto en difinitaj periodoj dum la kongreso;

(g) realigi postkongresan informadon pri IJK al esperantista aŭ/kaj neesperantista publiko (ekz. artikolon, filmeton, kanton aŭ alitipan artaĵon, aŭ prelegon);

(h) partopreni retrokupladon pri la kongreso;

(i) reiri al sia hejmlando post la kongreso kaj daŭrigi agadon en la loka Esperanto-movado per la spertoj kaj konoj akiritaj dumkongrese;

(j) dokumenti ĉiujn elspezojn rilate sian partoprenon en IJK kaj sendi pruvilojn pri elspezoj al la Kasisto de TEJO.

Artikolo 17. Elektitaj kandidatoj subskribas kun TEJO interkonsenton pri reciproka subteno. Per la interkonsento la elektito akceptas plenumi ĉiujn devojn preskribitajn en Artikolo 16. La estrarano aŭ oficisto pri Kongresoj kontrolas kaj certigas reciprokan plenumon de ĉiuj interkonsentitaj kondiĉoj.

Artikolo 18. TEJO rajtas anonci la nomojn kaj loĝlandojn de la elektitoj en siaj informkanaloj. Krome, TEJO rajtas publikigi intervjuojn, artikolojn, fotojn, filmetojn, kaj aliajn publikajn materialojn pri/de siaj subtenatoj en siaj informkanaloj.

Preparado de vojaĝo.

Artikolo 19. Subtenatoj aliĝas al IJK per la reta aliĝilo, elektas la plej malmultekostan loĝeblon kaj indikas ke ili estas subtenataj de la fonduso. La Kongresa Komisiono aplikas la necesajn rabatojn.

Artikolo 20. Subtenatoj detale raportas al la estrarano aŭ la oficisto pri Kongresoj pri planataj itineroj kun datoj de alveno kaj foriro kaj ĝisdataj proksimumaj kostoj de vojaĝoj el siaj loĝurboj ĝis la kongresejo, en eŭroj kaj la loka valuto.

Subtenatoj nepre ne mendu biletojn sen antaŭa konsento de la estrarano aŭ oficisto pri la itinero kaj kostoj.

Artikolo 21. Se subtenato deziras resti pli longe antaŭ aŭ post la kongreso, tiu devas nepre konsiliĝi ĉe la estrarano aŭ oficisto pri Kongresoj, speciale kiam tio povas influi la entuton de kostoj de la vojaĝo;

Artikolo 22. Subtenatoj laŭeble elektan la plej rektan, malmultekostan kaj ekologian manieron vojaĝi inter siaj loĝurboj kaj la kongresejo. Se pro iuj kialoj oni bezonas aparte mendi aldonaĵojn (bagaĝ-spacon, dumflugajn manĝaĵojn ktp.), tiu unue petu konsenton de la estrarano aŭ oficisto pri Kongresoj. Krome, kiam eblas, subtenato konsideru mendi nuligeblajn biletojn, se estas kondiĉoj kiuj povus fine malhelpi ties vojaĝon (ekz. vizaj postuloj).

Artikolo 23. Subtenatoj laŭeble devas antaŭmendi ĉiujn siajn vojaĝojn per ciferecaj manieroj por certigi ke ili ricevos pruvilojn pri mendoj kaj pagoj.

Artikolo 24. Subtenato mem unue financas siajn vojaĝkostojn, kaj repagoj estos faritaj de TEJO al la subtenato nur post la kongreso kaj eventuala plenumo de ĉiuj respondecoj. Tamen, se en esceptaj kazoj la subtenato ne disponas pri la rimedoj necesaj por tion fari, TEJO povas mem mendi la biletojn.

Artikolo 25. Subtenatoj kiuj bezonas peti vizon laŭeble komencu la procezon kiel eble plej frue. Por faciligi eldonadon de invitleteroj kaj konfimiloj pri loĝado flanke de TEJO, subtenato sendu skanitan kopion de la identiga paĝo de sia pasporto al la oficisto pri Kongresoj aŭ la organizanto respondeca pri vizpetado.

Artikolo 26. Se subtenato bezonas alveni kelkajn tagojn antaŭ IJK kaj/aŭ resti kelkajn tagojn poste, la Kongresa Komisiono povas helpi pri serĉado de malmultekostaj loĝebloj, ekzemple per gastado ĉe lokaj esperantistoj.

Artikolo 27. Subtenatoj mendu laŭeble la plej malmultekostan vojaĝasekuron kiu validu dum sia tuta vojaĝo. Subtenatoj ankaŭ kontrolu, ĉu necesas vakcinoj aŭ aliaj sanrilataj postuloj por la vojaĝo.

Artikolo 28. La Kongresa Komisiono laŭeble asistas subtenatojn en la plenumo de ĉiuj leĝaj postuloj por senproblema vojaĝo al la kongreso, sed fine ĉiu subtenato mem respondecas pri zorgaj kontrolado kaj plenumado de ĉiuj postuloj en sia loĝlando, la gastiga lando, kaj ĉiuj landoj tra kiuj tiu transiras.

Artikolo 29. Post mendado de biletoj, peto pri vizo, ricevo de rezulto de vizpetado, kaj pri aliaj evoluoj en la preparado de la vojaĝo, subtenatoj laŭeble regule informu la estraranon aŭ oficiston pri Kongresoj.

Repagoj

Artikolo 30. Pri la realigo de ĉiuj repagoj respondecas la Kasisto de TEJO aŭ persono delegita de la Kasisto.

Artikolo 31. Ĉiuj repagoj laŭeble devas okazi per la bankokonto posedata de la subtenato. Se tio ne eblas, subtenato informu la Kasiston pri aldonaj manieroj por ricevi la repagon. En la plej lasta kazo la subtenato estos repagita per sia konto en Universala Esperanto-Asocio (UEA). Neniel repagoj povas okazi en kontanta mono.

Artikolo 32. Post la vojaĝo de la subtenato li aŭ ŝi plenigas repagformularon eldonitan de la Kasisto de TEJO kaj sendas ĝin, kune kun ĉiuj pruviloj pri elspezoj, ene de 60 tagoj ekde la lasta tago de la kongreso. En la repagformularo devas esti laŭeble detale indikitaj:

(a) pri vojaĝoj per aviadilo aŭ alitipa transporto: la datoj de la vojaĝo, la origino kaj la destino, kaj la tuta prezo pagita (en la valuto en kiu la pago okazis);

(b) pri restado en hoteloj ktp: la nomo de la gasto, la datoj de la restado, kaj la tuta prezo pagita (en la valuto en kiu la pago okazis); kaj

(c) aliaj kostoj: la celo de la elspezo, la dato en kiu la elspezo okazis, kaj la tuta prezo pagita (en la valuto en kiu la pago okazis).

Artikolo 33. Ĉiujn elspezdeklarojn nepre akompanu valida pruvilo pri kostoj kaj pagoj (biletoj, fakturoj, kvitancoj, ktp.). Ĉiuj pruviloj estu en PDF-formato kun A4-grandeco. Se kvitancoj aŭ fakturoj estis akiritaj papere, ili estu laŭeble klare skanitaj unuope sur A4-granda paĝo en PDF formato. Ekrankaptoj de retpaĝoj aŭ apoj ne validas kiel pruviloj.

Artikolo 34. Por ke la pruvilo pri enspezo estu valida kaj la elspezo estu repagita, necesas:

(a) Pri vojaĝoj per aviadilo aŭ alitipa transporto: ciferecaj aŭ paperaj biletoj kiuj klare indikas: la nomon de la vojaĝinto, la datojn kaj horojn de la vojaĝo, la originon kaj la destinon, la servojn inkluzivitajn en la vojaĝo, kaj la tutan prezon pagitan (en la valuto en kiu la pago okazis), kaj, se la bileto ne montras eksplicite ke ĝi estis pagita, kvitanco aŭ alitipa konfirmo pri pago;

(b) Pri restado en hoteloj: konfirmitaj rezervoj kiuj klare indikas la nomon de la gasto, la datojn de la restado, kaj la tutan prezon pagitan (en la valuto en kiu la pago okazis), kaj, se la rezervo ne montras eksplicite ke ĝi estis pagita, kvitanco aŭ alitipa konfirmo pri pago;

(c) Pri manĝoj: kvitancoj aŭ fakturoj kiuj klare indikas la nomon de la kliento, kaj, je ties manko, indikon, ke la manĝojn pagis la subtenato; la daton kaj horon de la mendo, la manĝojn kaj trinkaĵojn menditajn, kaj la tutan prezon pagitan (en la valuto en kiu la pago okazis);

(d) Pri ĉiuj aliaj elspezoj: kvitanco aŭ fakturo kiu klare indikas la nomon de la mendinto aŭ paginto, la servojn aŭ varojn menditajn, la daton de la mendo, kaj la tutan prezon pagitan (en la valuto en kiu la pago okazis);

Artikolo 35. La Kasisto de TEJO aŭ la oficisto pri Kongresoj rajtas postuli pli da informoj aŭ dokumentoj se la jam prezentitaj dokumentoj ne sufiĉe klarigas aŭ pravigas la elspezon. Krome, la Kasisto rajtas rifuzi repagon pri ajna elspezo se la subtenato ne prezentas kompletajn aŭ klarajn pruvilojn pri pago, aŭ se la elspezo aŭ sumo ne estas pravigebla sub ekzistantaj kondiĉoj de ĉi tiu Regularo kaj interkonsentoj inter TEJO kaj la subtenato.

Artikolo 36. La Kasisto de TEJO aŭ persono delegita de la Kasisto laŭeble pritraktas la repagopeton kaj realigas la repagon ne pli ol 60 tagojn post la ricevo de la peto. En tiu periodo, oni kontrolas la plenumon de ĉiuj respondecoj de la subtenato kun la estrarano aŭ oficisto pri Kongresoj aŭ kun la Kongresa Komisiono. Li aŭ ŝi ankaŭ kalkulas la finan repageblan sumon (en eŭroj, laŭ tiama kurzo) kaj informas la subtenaton pri tiu sumo kaj la stato de la repago. Kaze de malfacilaĵoj pri repagado ili kune esploru solvojn.

Artikolo 37. Administrajn kostojn de la repago (ĉe bankoj kaj aliaj pagmanieroj) laŭeble transprenas TEJO.

Artikolo 38. La subtenato informu la Kasiston tuj post ricevo de la repago.

Nuligo de subteno

Artikolo 39. Laŭ la rekomendo de la Kongresa Komisiono aŭ la oficisto pri Kongresoj, la Estraro de TEJO rajtas nuligi subtenon (aŭ parton de ĝi) en ajna momento se la subtenato:

(a) propravole rezignas pri subteno;

(b) malrespekte kaj ĝene kondutas dum la kongreso kontraŭ aliaj kongresanoj aŭ aliaj homoj en la kongresejo aŭ entreprenas agojn kiuj difektas la programon, posedaĵojn, aŭ la reputacion de la kongreso kaj TEJO;

(c) estas prezentinta falsan informon en sia kandidatiĝo;

(d) ĉeestas malpli ol kvin (5) tagojn de la kongreso;

(e) trovas alian manieron financi sian partoprenon en la kongreso;

(f) malsukcesas plenumi, malgraŭ ripetaj memorigoj, taskojn interkonsentitajn antaŭ, dum, aŭ post la kongreso, sen sufiĉa pravigo; aŭ

(g) ne prezentas kontentigajn pruvilojn pri kongresrilataj elspezoj laŭ reguloj de ĉi tiu Regularo.

Artikolo 40. La Estraro rajtas nuligi subtenon kaj rifuzi repagon sendepende de tio, ĉu la subtenato jam faris elspezojn aŭ ne. La Estraro laŭnecese ankaŭ rajtas postuli

al la individuo, el kiu ĝi retiris sian subtenon, la repagon de elspezoj jam faritaj de TEJO kaj, laŭnecese, kompensojn pro damaĝoj.

Artikolo 41. Malakceptita vizpeto ne nepre signifas nuligon de subteno, sed la Estraro kaj la subtenato interkonsentu pri repageblaj kostoj kaj kune trovu manierojn minimumigi elspezojn (ekzemple, per nuligado de ankoraŭ nuligeblaj biletoj, ktp).